PREZO: 1:– Kr.

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1944.

MALGRANDA

# N:RO 1 REVUO 1944

2 a JARO

ENHAVO:


| | Paĝo |
|---|---|
| Popolaj movadoj kaj paco, de Stellan Engholm | 1 |
| Pensoj, de P. Th. Justesen | 6 |
| Post la milito, de Einar Hult | 14 |
| Vintromezo apud Hjälmaren, de Ajo Allinger | 16 |
| La arto de pensado, de Ali Ahlberg | 20 |
| Aŭtuna memoraĵo, de Martti Suominen | 32 |


*Redaktoro — Eldonanto:*

*STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO*

# MALGRANDA REVUO

N:ro 1 2:a JARO 1944


## Popolaj movadoj kaj paco

*De STELLAN ENGHOLM*

"Tri, kvar homoj decidas — milionoj mortas."

Tiel esprimis sian opinion pri militoj forkurinta milit-kaptito, kiu nun estas arbarlaboristo proksime al mia urbo. Mi kredas, ke la pli multaj homoj en ĉiuj landoj havas la saman opinion. Certe vi ĉiuj aŭdis la saman aserton, kvankam la vortoj eble ne estis samaj.

Eksperto pri sociaj-internaciaj demandoj verŝajne skuas kompate siajn ŝultrojn, kiam li aŭdas tian konstaton. Multe, multe pli implikitaj estas la kaŭzoj de militoj, li diras, kaj malfacile estas trovi vojon al daŭra paco.

La eksperto pravas. Tamen — se li en sia rezonado preteriras tiun konstaton de la simplaj homoj, li faras pli grandan eraron, ol la simplulo faras per sia kategoria aserto. En tiu troviĝas penso, kiu estas universale vera, kaj kiu estas fundamente grava por daŭra paco.

Estas fakto, ke en ĉiuj landoj la pli multaj homoj ne volas militi. Estas tute natura sento: vivanta estaĵo ĝenerale ŝatas nek suferi nek morti. Ili povas memvole kaj suferi kaj oferi sian vivon, se ili vidas grandan sencon en tio. Sed militaj suferoj kaj morto estas sensenca malbono eĉ por tiu soldato, kiu efektive batalas por la libero de sia patrujo. Se dependus de la vastaj popolamasoj, de la homoj, kiuj per pena laboro akiras sian vivtenon, ni ne

havus militojn. Ofte ili malmulte konas la pli subtilajn ĝojojn de la vivo, sed ili bone scias, kiom da peno kostas por tute simple konservi la vivon kaj konservi necesan ordon en la kunvivado de la homoj. Ili scias la prezon por la homa vivado, ĉar ili pagis ĝin per propraj peno kaj sufero, per manko de propra libero kaj manko de ebloj por evoluo. Kaj ne nur por si mem ili pagis, eĉ por tiuj ili pagis, kiuj pli feliĉe vivas. Por tiuj estas frenezaĵo kaŭzi suferojn, detrui homvivojn, detrui la kreaĵojn de homa penado.

Tiu granda plimulto de la homoj en ĉiuj popoloj ne volas militi — tio estas fakto. Sekve la malpli multaj estas kaŭzantoj de militoj. Kaj la veraj aranĝantoj estas tre malmultaj.

El tio sekvas, ke popola memregado estas nepre necesa kiel fundamento por daŭra paco. Kompreneble povas okazi, ke unuope decidanta persono aŭ grupo da tiaj personoj volas pacon kaj bone gvidas la aferojn de sia popolo. Sed tia ŝanco estas ege malgranda kompare kun la grandega risko, ke solreganto aŭ solreganta grupo da homoj malbone uzas la potencon kaj gvidas la popolon laŭ propra intereso, potencavido kaj gloramo, aŭ laŭ strangaj ideoj. Kiam ankoraŭ troviĝas tia reĝimo en iu lando, se estus eĉ unu sola, troviĝas ankaŭ risko por milito, pli malpli danĝera laŭ la potenco de tiu lando.

Ĉu malbona uzo de la regopovo do ne povas okazi en lando kun popola memregado? Certe tio povas okazi, kaj certe ĝi povas ankaŭ konduki al milito. Por ke popola memregado donu tiun rezulton, kiun la homoj deziras, estas necese, ke la homoj mem direktu la regadon de sia lando. Tio postulas multe da viglo kaj aktiva politika-socia laboro kaj spirita klopodado de la vasta amaso de la homoj. Nur tiel ili povas sendi efektive proprajn reprezentantojn al la parlamento kaj en la registaron. Se parlamento grandparte konsistas el advokatoj aŭ aliaj specialaj grupoj de homoj, oni povas esti tute certa, ke la popolanoj ne elektas la reprezentantojn kaj tiel direktas la regadon de la lando, sed ke estas la tiel nomataj reprezentantoj,



kiuj elektigas sin mem, kaj ke ili kiel profesiaj politikistoj gvidas la aferojn laŭ propra bontrovo, dum la vasta amaso de la popolo restas indiferenta kaj pro tio seninflua. Tia regado fakte ne estas multe pli bona ol diktatora reĝimo.

Eĉ vere demokratia lando ne estas libera de tiaj danĝeroj. Homoj diverse pensas kaj havas diversajn konvinkojn. Pro tio estiĝas partioj. Se tiel okazas, ke partio fariĝas celo en si mem, kaj ke ĝi pli atentas la internan partian intereson ol la efektivan intereson de la homoj, kaj se partioj komencas interlukti sole por partiaj interesoj, tiuokaze ankaŭ tiuj politikistoj fariĝis profesiaj kaj ne plu estas veraj reprezentantoj de la popolo. Por eviti tian danĝeron la pli granda parto de la elektantoj devas esti kontentige vigla kaj aktiva por starigi opozicion kaj anstataŭigi malnovajn reprezentantojn per novaj, se tio montriĝas necesa.

Efektiva popola memregado devas havi kiel fundamenton la vastan amason de la popolo mem. Per tio mi ne volas diri, ke parlamento konsistu sole el laboristoj kaj terkulturistoj. Ankaŭ pli kleraj kaj instruitaj homoj estas necesaj. Sed ili devas esti veraj reprezentantoj de la popolo, ne reprezentantoj de propraj aŭ grupaj interesoj.

Granda malhelpo por efektiva demokratia ordo estas tio, ke tre granda parto, foje la pli granda, de la popoloj ne aktive interesas sin por la propra influo al la direktado de la aferoj. En plej bona okazo oni balotas sed cetere neniel okupas sin pri tiaj aferoj. Por la rezultoj de la politiko oni havas intereson, sed ne por tiu laboro, kiu estas necesa por atingi la rezultojn.

La plimulto de la homoj volas pacon. Sed kiel atingi ĝin, se tiu plimulto estas politike tro inerta por efektivigi sian deziron per politika agado. Kiam ili ankoraŭ ne faris tion, troviĝas ĉiam homoj, kiuj utiligas cirkonstancojn por krei maltrankvilon kaj malpacon. Kaj temas ja ne nur pri unu aŭ kelkaj landoj. Nur en tre malmultaj landoj ekzistas vera popola memregado. Kiam la ceteraj venos al tiu stato?

La perspektivo por daŭra paco kreita per politika agado ŝajnas ne tre esperiga.

Tamen troviĝas instrumento por krei pacon, kiu povus fariĝi tre efika, jes, mi opinias, ke ĝi estas fundamente grava por la klopodoj krei daŭran pacon. Tio estas la popolaj movadoj.

Ankaŭ la popolaj movadoj kaj la homoj en ili estas reprezentantoj por la vasta amaso de la homoj, ofte pli rekte kaj pli vere ol estas deputitoj. La popolaj movadoj montras ankaŭ tion, ke politika inerto ĉe granda parto de la popolo ne nepre signifas ĝeneralan inerton. Multaj el tiuj, kiuj tute ne partoprenas politikon, estas viglaj kaj taŭgaj homoj en aliaj movadoj.

Ke Svedujo estas unu el la plej feliĉaj kaj bone organizitaj landoj, kaj ke ĝia popola memregado efektive meritas tiun nomon, tio en tre alta grado dependas de la homoj el la vasta popolamaso kaj ilia agado en kaj per la popolaj movadoj. Multe ni ŝuldas al lertaj gvidantoj de industrio kaj komerco, al inventistoj kaj sciencistoj, al kleruloj klopodintaj por bono al la popolo. Sed same multe la nuna stato de la popolo dependas de la simplaj popolanoj mem. Imagu, ke ĉiuj laboristoj estus sencscepte restintaj nuraj laborantoj, sen aspiroj al pli bonaj ekonomiaj cirkonstancoj, sen aspiroj al spirita evoluo, sen aspiroj al bona socia ordo! Kia estus nun la stato en tia okazo?

La popolaj movadoj estas ege gravaj instrumentoj por progreso kaj evoluo. Per la sindikata movado la homoj kreis al si tolereblajn ekonomiajn cirkonstancojn, kaj en tiu rilato ege helpis ankaŭ la kooperativa movado. Per movadoj religiaj, abstinencaj kaj klerigaj oni kreis pli bonajn morojn, pli bonan konduton, komprenon por kaj sopiron al spiritaj valoroj. Kaj ĝuste pro la evoluo, kiun tiuj movadoj donis al la simplaj homoj, ili fariĝis kapablaj uzi por sia bono ankaŭ la politikan instrumenton.

Ĉu tiaj movadoj ne taŭgas por esprimi la pacovolon? Ĉu ili ne povus esti mirinda instrumento ankaŭ por realigi ĝin? Kaj tiom grandan procenton de la popolo ampleksas la popolaj movadoj, ke fakte preskaŭ neniuj homoj restas ekster ili. Ĉu do ne estas preskaŭ memkomprenebla afero, ke ĝuste la popolaj movadoj devus fariĝi instrumento por



krei daŭran pacon? Se nur en la malgranda sveda popola milionoj da homoj estas tiel kunligitaj en komuna laboro por progreso kaj evoluo, kaj ĉiuj tiuj homoj senescepte volas pacon — ĉu ne estus krimo ne utiligi tiun grandan potencon por tiuj klopodoj, kiuj en la nuna tempo estas pli gravaj ol io alia?

Jen vi membroj de sindikatoj, kooperativanoj, kristanoj en diversaj religiaj organizoj, anoj de studrondoj kaj klerigaj asocioj, membroj de abstinencaj societoj, ĉiuj, ĉiuj, kaj fine sed ne laste la gejunuloj en la junularaj organizoj, vi, la junaj centmiloj de la estonto — ĉu tia afero ne estas inda tasko por ni?

Sed kiel efektivigi tion? Same kiel vi ĝis nun faris. Malgrandaj lokaj organizoj kunlaboris kaj helpis unu la alian, fariĝis distrikto de organizoj, fariĝis tutlanda unuiĝo. Ĉu ne estas memkomprenebIe, ke vi turnu vin al la samspecaj organizoj en najbaraj kaj eĉ en malproksimaj landoj por kunlabori kun ili por tiuj celoj, kiuj finfine estas komunaj por la tuta homaro, unue por viaj propraj celoj, due sed ankoraŭ pli grave por krei daŭran pacon? Kaj kiom grandiozan laboron por tio ne povus fari ekzemple la sindikataj movadoj kaj la kristanaj organizoj!

La movadoj eldonu internaciajn gazetojn por certaj teritorioj aŭ por la tuta mondo kaj eldonu broŝurojn kaj librojn por komuna internacia membraro, oni faru konferencojn kaj kongresojn, la diverslandaj homoj persone konatiĝu unu kun alia. Tiel ni kreu el la pasiva pacodeziro ĉe la plimulto el ĉiuj landoj aktivan pacokonscion, aktivan sintenon rilate al milito kaj paco. Tiel homoj en landoj kun popola memregado lernos utiligi sian decidorajton, se ili antaŭe tion ne lernis, kaj eĉ en landoj sen popola memregado ni trovos kontakton kun la homoj.

Verdire la popolaj movadoj ne estas same evoluintaj en ĉiuj landoj. Tamen troviĝas en ĉiu lando iu aŭ iuj popolaj movadoj, kaj tio estas sufiĉa por doni komencan kontakton.

*

Esperantistoj, kiuj estas membroj en popolaj movadoj

— ĉu vi ne volas helpi disvastigi tiujn vidpunktojn en viaj organizoj? Esperantistoj, kiuj estas sole esperantistoj — ĉu vi ne volas serĉi kontakton kun popolaj movadoj por akiri ilin kiel plej valorajn kunlaborantojn por niaj klopodoj?

En Svedujo ni havas eminentajn esperantistojn, kiuj estas eminentuloj ankaŭ en laborista, kleriga, kristana, abstinenca kaj verŝajne ankaŭ en aliaj popolaj movadoj. Voku ilin por fari paroladojn en viaj organizoj, en viaj konferencoj kaj kongresoj. Kompreneble la lokaj organizoj povas aranĝi ankaŭ publikajn paroladojn.

Ke tia agado de la popolaj movadoj estas ebla nur per helpo de esperanto estas memkomprenebla afero, kiun mi ne bezonas klarigi al esperantistoj. Sed al la membroj de la popolaj movadoj ni devas klarigi tion. Por internacia vera popola memrego estas necesa lingvo, kiun la pli multaj popolanoj en ĉiuj landoj povas legi, paroli kaj skribi, kaj kiun ili povas uzi por pensado same bone kiel la gepatran.

---

## Pensoj

*De P. TH. JUSTESEN*

Pensi ni ja ĉiuj povas — sed kiel ni tion faras? Eble ne estas facile respondi al tiu demando. Ni provu!

Mi nun volas pensi pri Stokholmo. Kion signifas tio? Evidente mi en iu aŭ alia mistera maniero malfermas pordeton de ĉambro en mia konscio, en kiu troviĝas amaso da bildoj el tiu ĉefurbo. En la momento, kiam mia interna voĉo konigas mian decidon, eksvarmas en mian konscion, kaj en sovaĝa konfuzo, multege da bildoj el Stokholmo. Mi iras en Riddarholmskyrkan[1] kaj rigardas danajn flagojn kaj standardojn. Mi sidas en aŭto sur pompa, alta

1) Preĝejo kun reĝaj tomboj.



ponto, de kie estas admirinda vido sur grandajn partojn de la urbo. Mi vidas la lagon Mälaren, Vaxholm[2] ktp.

Certe estis plenplene en la ĉambro. Oni estas preskaŭ superŝutata per la bildoj, kiuj elvenas. Tamen oni vidas ilin unu post la alia. Provu imagi la reĝan kastelon! Poste Riddarholmskyrkan! Poste ambaŭ samtempe! Tio lasta ne estas ebla. Ili luktas unu kontraŭ la alia pri loko. Jen unu bildo estas klara, jen alia, neniam ambaŭ samtempe. Evidente ni en la kapo havas bildsurfacon, sur kiuj ili aperas kvazaŭ lumbildoj sur tuko.

Sed ni povas fari la eksperimenton ankaŭ en iom alia maniero. Mi povas reaperigi al mi tion, kion mi travivis kun juna svedino en Londono 1938. Kion mi faras? Evidente mi premas butonon, kiu donas movon al motoro, ĉar tuj la plej agrabla filmo komencas ruliĝi: Mi venas el la ĉambro de mia hotelo, kie mi loĝas kune kun diversaj aliaj svedaj partoprenantoj en la kongresa karavano de Malmgren. Mi vidas junulinon en verda robo, ĉarman, modestan, trankvilan virineton. Mi demandas ŝin, ĉu ankaŭ ŝi iras al la teatro. "Jes", ŝi diras. — "En tiu okazo vi devas rapidi. Estas preskaŭ tro malfrue." — "Jes, sed mi ne scias la vojon." — "Ankaŭ mi ne scias, sed mi mendos aŭton. Ĉu vi volas veturi kune?" Tion ŝi volis, kaj baldaŭ ni sidis kune en la veturilo. Ni sidis kune ankaŭ dum la prezentado, kaj poste ni kune reiris al la hotelo. Unue ni iris al stacio de subtera fervojo. Tie estis terure multe da homoj, kaj kiam venis la trajno, ili dum granda premado rapidis en la vagonon. Por momento mi disiĝis de mia akompanantino, sed mi vidis la verdan robon preni lokon en iu angulo kaj mi sukcesis ricevi lokon apude. Dum la veturo mi parolis al ŝi en esperanto pri la prezentado, pri la kongreso ktp. Ŝi silente aŭskultis min sed nenion diris. Fine mi diris: "Jen ni devas eliri!" Mi levis min kaj iris al la pordo, kaj denove estis granda premo. Mi rigardis returne. Kie estas la sveda junulino? Subite mi vidis, ke la verda robo tute trankvile restas en sia angulloko en la

2) Urbo en la insularo ekster Stokholmo.

vagono, kaj mi kriis al ŝi: "Venu! Rapidu! La trajno tuj ekveturos!" Ŝi ridetis sed restis trankvile sidanta, kaj nun mi ekvidis, ke tute ne estas la sveda junulino sed alia virino, kiu ankaŭ portas verdan robon. La trajno ekveturis. Mi turnis min. Jes, tie staris la ĝusta verda robo kaj atendis. Poste ni kune iris al la hotelo, kaj la aventuro estis finita.

Sed se mi nun petas vin pensi pri Pyrrhos, certe kelkaj ricevas la senton, ke ili rigardas en nigran truon. Ili ne povas trovi pordeton kun la nomo Pyrrhos, kaj ili ne havas ŝlosilon, kiu povas malfermi tian pordeton. Tiuj neniam aŭdis pri Pyrrhos. Aliaj estas tute certaj, ke tia pordeto ekzistas. Ili nur ne povas trovi ĝin. Ili ĉirkaŭkuras kun la ŝlosilo en la mano sed ne trovas la ŝlosiltruon. Ili bone scias, ke ili iam aŭdis ion pri tiu homo. Ĉu ne estis greko? Aliaj kontraŭe tuj metas la ŝlosilon en la truon, kaj tuj la bildoj aperas: Li estis reĝo en Epeiros, militis kontraŭ la romanoj ktp. — Sekve ne ĉiam estas same facile pensi. Oni povas tion fari nur tiam, kiam certaj kondiĉoj estas plenumitaj.

Amiko en Randers iam invitis min kaj petis min kunporti kelkajn lumbildojn, por ke mi parolu por liaj gastoj pri Nederlanda Hindujo, kiun mi bone konas, ĉar tie mi vivis kaj laboris 26 jarojn. Mi venis kaj faris la paroladon, kiu daŭris unu kaj duonan horon, kaj kiu evidente treege interesis la aŭskultantojn. Dum la kelkaj restantaj horoj de la vespero oni nome parolis ekskluzive pri Nederlanda Hindujo. Kiam la gastoj fine estis foririntaj, mi rimarkis, ke mi troviĝas en tre kurioza stato: mi ne scias, kie mi estas. Kompreneble mi vidis, ke mi estas en la domo de mia amiko, sed kio estas ekster ĝi, tion mi tute ne povis klarigi al mi, kvankam mi estis tie multajn fojojn. Post kelktempa cerbumado (kiam mi rigardis en "la nigran truon") mi eltrovis, ke mi estas en Randers. Tio sonas ne kredebla, sed fakte pasis ĉirkaŭ duonhoro, antaŭ ol mi povis aperigi la bildojn de la ĝardeno, la ŝoseo ktp. ekster la domo. Mi sekve ne nur malfermis la pordeton kun la surskribo "Nederlanda Hindujo", sed mem eĉ enrampis



en la ĉambron kaj tiel internen, ke mi ne povis eliri kaj rememori la aktualan ĉirkaŭaĵon.

Tute similan aferon mi travivis tie ĉi en mia propra ĉambro. Mi okupis min pri iu scienca, biologia fenomeno, kaj mi ekpensis, ke devas esti eble pliklarigi ĝin per observado de infuzorioj. Mi profundiĝis en konsideroj pri certaj eksperimentoj, kiujn oni povas fari, kaj pensis pri multaj spertoj, kiujn mi antaŭe faris en la mikroskopo pri tiuj bestoj. Fine mi decidis, ke la venontan tagon mi alportu iom da marĉakvo por esploro. Sed kie mi prenu ĝin? — En tiu tempopunkto mi "konsciiĝis". Mi vidis min sidanta ĉe tablo. Mi ja rekonis ĉiujn objektojn en la ĉambro kaj mian edzinon, kiu sidis leganta ĉe la alia flanko de la tablo; sed kie la domo troviĝas, mi ne scias. Mi longe sidis kaj cerbumis pri tio, en kiu lando mi efektive troviĝas. Post kelka tempo venis la penso "Jylland". Iom poste fariĝis klare por mi, ke mi estas en Fannerup. Estas ja ĝardeno ekster la domo. Estas rivero. Subite mi estis tute konscia pri ĉiuj ĉirkaŭaĵoj. Mi denove estis hejme.

Certe mi ĉiuj plurfoje travivis tiun fenomenon en pli milda formo. Foje okazas, ke oni vekiĝas en la mateno kaj ne scias, kie oni estas. Nur iom post iom oni tute orientiĝas en siaj ĉirkaŭaĵoj.

Kelkajn aliajn samspecajn travivaĵojn mi havas, kaj ili estis de iom pli terura karaktero.

Mi kuŝis en malsanulejo en Sumatra kaj estis preskaŭ mortinta de tifoida febro. Kiam okazis tio, pri kio mi rakontos, mi tamen estis en bona resaniĝo kaj proksimume tute klara en la kapo. Iun nokton mi vekiĝis kaj vidis unu el miaj kolegoj enveni tra la pordo. Li iris al mia lito kaj diris, ke li havas rajton pri la kovriloj sur ĝi, post kio li prenis ilin kaj foriris.

Mi profunde ekscitiĝis pro tia trakto kaj vokis la flegiston, kiu sidis ekstere sur la verando. Kiam li envenis, mi severe admonis lin pro tio, ke li permesis al dro W. enveni meze en la nokto kaj preni miajn kovrilojn. "Neniu homo estis tie ĉi", diris la soldato. "Tamen estis", mi diris. "Ĝuste en la pasinta momento dro W. eliris tra la pordo

kaj kunprenis la kovrilojn." "Ili ja kuŝas tie", diris la soldato kaj montris al mia lito. Mi rigardis ilin. Ili estis tie, kaj mi komprenis, ke mi havis halucinon.

Alian nokton mi opiniis, ke mi eksciis, ke mia edzino ĝuste naskis infanon, kaj ege mi surpriziĝis la sekvantan posttagmezon, kiam mi subite vidis ŝin enveni tra la pordo. "Kion signifas tio?" mi diris. "Kiel vi povas veni? Vi ja naskis infanon la pasintan nokton." "Ne, en tio vi eraras", diris mia edzino. "Ne, tion mi tute ne faras", mi diris. "Tri fojojn oni diris tion al mi." Iom post iom ŝi tamen sukcesis pruvi al mi, ke mi "sonĝis" la aferon.

Plej kurioza tamen estis jena okazo. En la tago oni portis al mi kajeron, en kiu mi kvitancu la monatan salajron, kiun oni pagos al mia edzino. Samtempe oni informis, ke oni forprenis certan sumon, sed mi ne eksciis kial. Tio tamen ege interesis min, kaj la tutan tagon mi cerbumis pri la afero. La sekvantan nokton mi sonĝis, ke la kolego, kiu pro mia malsano transprenis mian malsanulejon, estis ŝtelinta de mi pakon da monbiletoj, kaj ke li en tiu tago estis sidinta en soleca loko kaj kalkulinta tiujn belajn biletojn. Subite iu venis, kaj por ke oni ne trovu la sekreton, li glutis ĉiujn paperojn. Tio tamen kaŭzis teruran mallakson, kaj post kelkaj tagoj li komprenis, ke li devas morti. Tial li skribis al la estro de la malsanulejo, kie mi kuŝis, ke li volas, ke oni portu lian kadavron al tiu malsanulejo, kaj ke mi esplortranĉu lin por tiel rericevi mian monon. Poste venis al mi sciigo, ke la kadavro venis kaj kuŝas en la mortintejo.

La postan matenon mi vekiĝis kaj estis tre okupita de tiu historio, kaj mi intencis demandi la fleganton, kiam la tranĉado okazos. Kiam li ĉirkaŭ la sesa horo venis por lavi min kaj neniun vorton diris pri la sufiĉe terura afero, mi trovis, ke tio ne estas afero por interparolo kun soldato. Mi decidis atendi ĝis la kontroliro ĉirkaŭ la deka. Ĝi venis, sed oni nenion diris pri la mortinta kolego. Kurioze mi tamen ne havis fortan emon paroli pri la afero, kaj mi tial decidis atendi ĝis la kvara, kiam venos mia edzino. Kompreneble ŝi rakontos, kion ŝi scias. Ŝi ankaŭ venis, sed ŝi



nenion diris pri la afero, kaj nun mi ne povis bridi min plu. "Tiu dro W. tamen certe estis tre degenerinta homo", mi komencis. — "Kial?" — "Nu, tamen! Ŝteli monon de kolego!" — "Tion li tamen ne faris." — "Jes, ĝuste tion li faris! Li ŝtelis multe da mono de mi, kaj li glutis ĝin, kaj li estas mortinta, kaj nun li kuŝas en la mortintejo, kaj mi tranĉos lin por rericevi mian monon." Mia edzino ridis per la tuta vizaĝo: "Tion vi sonĝis." Jen la sonĝo ĉesis, kaj mi komprenis, kiel freneza estas la tuta afero.

En tiuj tri okazoj mi do estis tute konscia pri tempo kaj loko. Sed mi fiksiĝis en "pensoĉeno" kaj ne povis kritike diferencigi iluzion de realo. Mi estis, kvankam maldorma, same senkritika kiel sonĝanto, kiu kredas realaj la bildojn, kiujn li vidas. En sonĝoj ni nome pensas, same kiel en maldorma stato. Ni vidas bildojn; sed ni tenas nin tute pasivaj. Ni ne ordigas la bildojn, kiuj venas tra la pordeto. Ni akceptas ilin, kiaj ili estas — kaj ili ofte estas tre fuŝitaj — kaj ni kunligas ilin en tute hazarda ordo. Dume tamen montriĝas, ke ni malgraŭ la dormo ne estas tute senkritikaj. Tiel mi memoras, ke mi sonĝis, kiam mi la unuan fojon estis en Stokholmo, ke mi estas hejme ĉe miaj gepatroj, sed ke ili parolas svede, kaj tion mi ne povis kompreni, ĉar ili ja ĉiam antaŭe parolis dane.

Ne malofte okazas, ke ni ne povas trovi nomon aŭ similan aferon, kvankam ni scias, ke ĝi troviĝas en nia "provizejo". Foje ni sukcesas "elfosi" ĝin. En aliaj okazoj ĝi "elkreskas" en pli malpli longa tempo. Tiel mi iun tagon ne sukcesis trovi la nomon de urbo en Suomujo (Finnlando), en kiu mi dum kelka tempo loĝis. "Estas io kun oka", mi diris al mi. Post kelka cerbumado venis la nomo. Estis Sjundeå. (Svede sju = sep.) Do estis io kun sep. Tie ĉi la fosado konsistis el tio, ke mi malfermis la sekcion "nombroj" kaj trovis la vorton, ne precize en skatolo 8, kiel mi atendis, sed en skatolo 7.

Alia okazo estas jena: Mi vizitis amikon en Svedujo, kaj li memoris kaj rakontis, ke li antaŭ 20 jaroj aŭdis min citi grekan verson. Li ne memoris, kio estis, nur, ke estis io pri "la ora Afrodite". Mi tute ne povis memori tion, kaj mi

ankaŭ ne pensis pri ĝi. Sed duonjaron poste mi iun tagon sidis en mia hejmo kaj matenmanĝis kun mia edzino. Subite mi rompis la interparolon, formetis tranĉilon kaj forkon kaj diris: "Jen vi devas aŭdi! Kiam mi lastfoje estis en Svedujo, diris M., ke li iam, kiam mi studis en Lund, aŭdis min citi grekan verson pri la ora Afrodite. Mi ne povis memori tion kaj poste ne pensis pri ĝi eĉ dum momento. Sed nun en tiu ĉi momento ĝi estas kvazaŭ stampita en mia konscio. Ĝi estas de Mimnermos kaj sonas jene: Tis te bios, ti de terpnon ater krysäs Aroditäs. Tetnajän, hote moj mäketi tauta meloj." — Tie ĉi ni do havas okazon, ke la bildo (la verso) ne volis veni, kiam ĝi estis vokata. Evidente ĝi estis kaŝita profunde, profunde malsupre, kaj amaso da musko estis kreskinta sur ĝi. Sed ĝi aŭdis la vokon, kaj ĝi volis veni, kaj duonan jaron ĝi silente luktis, pri kio mi tute ne sciis, ĝis kiam ĝi fine venkis ĉiujn barojn kaj venis en la lumon. — Kiu pensis en tiu okazo? Nu, oni certe devas diri, ke estis mi. Sed ĉiuokaze estis parto de mi, pri kiu mi ne havas eĉ plej malgrandan kontrolon.

Multe pli rimarkinda estis afero, kiun mi iam travivis en Sumatra, ĉar en tiu okazo tute nova scio venis en la mondon. Subite mi eksciis ion, kion certe ne sciis eĉ unu homo en la mondo. Temas pri la hebrea heroo Ŝimŝon. Certe ni ĉiuj lernis pri li en la infana lernejo, ke li kaptis 300 vulpojn, kunligis ilin du kaj du ĉe la vostoj, metante torĉon inter ilin, bruligis ĝin kaj pelis la bestojn en la filiŝtrajn kampojn por bruligi tiujn. Tiel la historio estas rakontita en ĉiuj eldonoj de la Malnova Testamento (Juĝistoj 15). Pri tiu historio mi certe ne pensis dum 40 jaroj. Sed oni devas supozi, ke iam, kiam mi estis ĉirkaŭ dekjara, komenciĝis subkonscia pensolaboro, kiu nur post tiom da jaroj donis rezulton, kaj tio en plej neatendita kaj plej surpriza maniero. Iun matenon mi staris kaj razis min, sen pensoj pri io ajn. Subite, kvazaŭ fulme, en parteto de sekundo, aperis por mi la historio pri Ŝimŝon, kaj absolute samtempe, sen iom ajn da pensa laboro, mi sciis, ke la historio estas absurda, kaj ke nur freneza homo povas tiel idiote konduti (imagu, ke oni kunligas la vostojn de du



hundoj kaj poste volas peli ilin en difinita direkto!), ke la historio tial devas esti miskomprenita kaj tute fuŝe tradukita, ke en la origina teksto certe estis io, kio kaŭzis la tradukon "du kaj du", ke la senco verŝajne estis tio, ke Ŝimŝon metis la voston de ĉiu vulpo d u o b l e, do faris maŝon, en kiun li metis la brulantan torĉon, post kio ĉiuj bestoj estis forpelataj por kaŭzi brulon. — Fine mi volas ankoraŭfoje akcenti, ke ĉio tio ne venis kiel pensoĉeno, sed ke ĉio en unu momento aperis por mi kiel io, kion mi scias. Tiamaniere oni do povas sen faka scio kaj sen ia ajn laboro veni al scienca rezulto.

Jen fine alia okazo, kiu ne estas malpli interesa. Antaŭ 18 jaroj mi faris longan vojaĝon, sola. Mi troviĝis sur oceanŝipo sur Meza maro. Iun vesperon mi ĝuste estis manĝinta en la manĝosalono kaj reiris al mia kajuto. Estis nenio neordinara en mia mensa stato, kaj mi pensis pri proksimume nenio. En la kajuto mi kuŝigis min sur mian liton. Mi ekpensis pri mia edzino, kaj en la sama momento mi ekaŭdis mirinde belan muzikon. Sonis kiel arĉa kvarteto kaj kvazaŭ la muzikistoj sidus tute apud mi. Tamen estis evidente, ke nenia muziko estis, kaj krom tio mi havis la senton, ke estas mi, kiu direktas kaj samtempe komponas la muzikon, kaj ŝajnis al mi, ke neniam antaŭe mi aŭdis ion tiel belan. Mi kuŝis ridetanta kaj ĝuis ĝin. Post unu aŭ du minutoj ĝi bedaŭrinde ĉesis. En la sama momento mi levis min, prenis krajonon kaj skribis jenan poemon, precize kvazaŭ laŭ dikto:

Se vin mi povus laŭdi,
kiel meritas vi,
fariĝus bela kanto.
Ĝi arbojn en arbar'
kaj ĉiujn montorokojn
al vasta, vasta migro povus logi.

Se emo estus pov'
kaj vortojn mi eltrovus,
fariĝus brila kant'.

Ĝin la printempaj ventoj
ĉe sunsubiro zumus
kaj ĉie sur la tero ĝin konigus.

Sed tio nekantebla
ĝi sonas en la brust'
skribsignoj belaj tie
parolas en silent'
pri vi, pri vi tutsole,
pri viaj vivo, vortoj, pensoj puraj.

Oni komprenu, ke mi tute ne estas poeto, eĉ se mi foje verkis iom da versoj, kaj ke antaŭe okazis nenio, kio povus kaŭzi estiĝon de tia afero. Kiam la stato daŭris, mi la tutan tempon sentis min kvazaŭ en alia mondo, en kiu tiujn liniojn estas diktataj al mi. Oni ja ankaŭ povas diri, ke ili estas rezulto de nekonscia pensoproceso; sed kiam tiu komenciĝis, kaj kio donis al ĝi la impulson, tion neniu povas diri.

---

## Post la milito

De EINAR HULT

Nuntempe oni vigle diskutas kaj preparas sin por solvi la problemojn, kiuj aktualiĝos post la milito. Ankaŭ ni esperantistoj nepre preparu nin por solvi niajn problemojn. Pro la milito ni perdis kontakton kun niaj eksterlandaj samideanoj, kaj en multaj landoj la esperantaj organizoj estas frakasitaj. Ankaŭ en nia lando la agado por esperanto malfortiĝis. Estos malfacila problemo por ni ripari tion, kion la milito detruis ne nur materie sed ankaŭ morale.

En la unua tempo post la milito la diversaj popoloj certe rigardos unu la alian kun certa malamo aŭ envio en la



koroj. Kiel ni agu por ŝanĝi la malamon en amon aŭ por almenaŭ malfortigi la venĝemon, kiun tiom da homoj sentas en la nuna momento?

Jen problemo, kiun ni nepre solvu. Per ĉiuj fortoj ni portoprenu la klopodojn por reorganizi la internacian kunlaboron en ĉiuj kampoj. Precipe ni faru tion, kiam temas pri reorganizado de la internacia esperantomovado. Krome ni dediĉu nin al plifortigo de niaj propraj esperantogrupoj.

Ni sekvu la ekzemplon de la savarmeanoj, kiuj ĉiam entuziasme kaj venkocerte batalas por sia movado. Ili ĉiam atentigas la homojn pri sia ekzisto kaj ne preterlasas ian okazon varbi novajn adeptojn. Kiel agas ni esperantistoj? Ĉu ni kun samaj entuziasmo kaj kuraĝo batalas por nia esperanta movado? Ĉu ne estas tiel, ke multaj el ni preskaŭ hontas pro sia esperantisteco kaj tute ne kuraĝas defendi nian lingvon, kiam ĝi estas atakata de kritikantoj?

Koncerne la tutmondan situacion ni atente studu la historion. Tie ni trovas, ke nenia malbono kaj ankaŭ ne la plej malluma kaj plej malĝojiga periodo daŭras eterne. Post kelka tempo tia periodo estas sekvata de periodo pli racia kaj pli ĝojiga. Post ĉiu vintro sekvas nova printempo, post pluvo sekvas sunbrilo, post ĉiu subpremo eklumas tago de nova libero. Multaj el ni emas turni la dorson al la esperanta movado, ĉar ĝia venko ŝajnas al ni malproksima aŭ eĉ utopia, sed tion ni ne faru! Male ni ankoraŭ pli streĉu niajn fortojn. Jes, ni kuraĝe dediĉu nin al laboro kun la firma kredo, ke ni spite al ĉiuj malfacilaĵoj tamen iam atingos nian celon, kiu nun ŝajnas tiel malproksima kaj nekredebla. Ie mi legis: "Unu afero estas verŝajna: neniu grava sukceso falos sen streĉa laboro en nian sinon. Tial ni devas ne laciĝi en laboro por nia idealo."

Nuntempe nia ĉefa problemo ne estas varbi novajn adeptojn al la lingvo sed konservi la intereson de la malnovaj. Antaŭ ĉio ni kreu esperantoklubojn, kiuj vere meritas la nomon. Ni altigu la kvaliton de la anoj, kaj ni pensu ne nur pri kvanto. En la kunvenoj esperanto okupu la honorlokon kaj ne kiel ĝis nun la duan. Krome ni memoru, ke

unueco estas forto. Ni metu flanken partitendencajn diskutojn en niaj esperantaj organizoj, kaj en la esperanta laboro ni estu unue esperantistoj. Kiel esperantistoj ni ja ĉiuj laboras por la sama celo, kaj tial ni sekvu ankaŭ la saman vojon.

---

# Vintromezo apud Hjälmaren

*De AJO ALLINGER*

Vera urbano ne rimarkas multe de la sezonaj ŝanĝoj. De ĉielo kaj nuboj li vidas ne grandan pecon inter la altaj domoj. Stelojn kaj lunon li observas pli facile en planedarejo. La diferencon inter somero kaj vintro li rimarkas prefere sur la hidrarga kolono de la termometro. Kiam li volas ekscii la veteron por la morgaŭa ekskurso, li ne memoras la veterajn sciojn, kiujn havis la prapatroj, sed legas la veterraportojn en ĵurnalo aŭ telefonas al Fraŭlino Vetero.[1]

Sed ne tiel la kampulo. Por sia vivoteno li multe dependas de veteraj ŝanĝoj. Respektoplene li studas la ĉiamajn nuanciĝojn en la fizionomio de la naturo mem. La maljunaj kamparanoj kaj fiŝistoj ofte estas spertaj viroj. Longe antaŭ ol la radio sendas la veteran prognozon, ili scias, kian veteron oni povas atendi. Sunbrilo kaj pluvo, ventego kaj fulmotondro sendas sian avangardon.

Mi ŝanĝis netolereblan vivon en la urbo kontraŭ restado en la provinco. Malnova amiko invitis min pasigi semajnon en lia eta bieno, kiu situas apud Hjälmaren[2]. Solbacken — Suna deklivo — nomiĝas la rava loko. Mi biciklis tien de Stokholmo. Ĝoja mi forlasis la stratojn de la urbego kun ĝiaj enuaj domvicoj kaj homsvarmado.

1) Telefona, aŭtomata veterservo en Stokholmo.
2) Granda lago en meza Svedujo.



Kun mi venis ankaŭ la vintro tien. La tagon post mia alveno la arbustoj antaŭ la fenestro portis koboldoĉapojn, kaj la betulojn drapiris arĝente brilanta vualo. Mi iris en la grandan vitroverandon kaj rigardis la dancantajn neĝerojn, grandajn, pezajn flokojn, kiuj gluiĝis al la trunkoj kaj branĉoj de la arboj. Virge bela la neĝo metis sin molforme sur la kampojn, kuŝis facile sur ŝtonoj kaj rokoj en la arbaro kaj en la lago. Sed la siringa laŭbo ŝajnis ree flori, kaj la prunelarbustoj ĉirkaŭ la kampoj aspektis kvazaŭ kotonplantejo.

Plej bele estis tamen proksime al Solbacken! Ĉirkaŭ ĝi la arbaro en sia ŝvelanta blankeco fariĝis vera fabeloregno. La altaj trunkoj de la pinoj estis neĝostukitaj sur la norda flanko, la piceoj klinis sin sub la pezo, kaj junaj, elastaj betuloj staris kurbaj super la arbara vojeto kvazaŭ ornamaj honorpordegoj por la ĵus venintaj gastoj.

Venis malvarmego, kaj la glacio sur la lago fariĝis firma dum kelkaj frostoklaraj noktoj. Krakis kaj tondris tra la aero, kiam la glacio formiĝis, akre sonis, kvazaŭ ŝtalo trafus ŝtalon. Tage radiis la suno sur sennuba ĉielo, kaj la aero estis vitroklara super la brilantaj vastejoj de Hjälmaren. Ankoraŭ la vaporŝipoj traluktis sian vojon inter Stokholmo kaj Örebro. Kelkfoje pasis en treno longa vico da karbopramoj, ofte ĝis sep. Sed iom post iom rigidiĝis ankaŭ la ŝipirejo en la malmola teno de glacio. Anstataŭe veturis malproksime sur la spegule glata surfaco malhelaj figuroj: fiŝistoj sur glitŝuoj, ŝovante siajn apogsledojn antaŭ si. Per trufarilo ili hakis malgrandan truon en la glacio kaj poste staris pacience atendante, ĝis perko aŭ lojto ekmordis la insidan logaĵon.

Ree neĝis, senĉese neĝadis, sed nun tio efikis kiel liberigo. Jen kuŝis la tero silenta kaj humila kiel pekinto kaj nur akceptis kaj akceptis. Colon post colo la blanka kovro leviĝis sur la vastejoj. Pli kaj pli profunda iĝis la blanka silentado en la arbaro — tiom profunda kaj kompleta, kvazaŭ ĉia vivado en la sovaĝejo estus mortinta. La bestoj estis kvazaŭ malaperintaj. Ankaŭ la pepado de la paruoj ĉesis. Ĉiuj serĉis ventoŝirmon kaj ripozon sub la pendantaj

brančoj, kie la neĝo preparis grotojn, en kiuj regis blu-blanka lumo.

Fine la spaco ŝajnis elverŝinta sian provizon da neĝo. Kiam la vintromeza suno ree eklumis inter pintrunkoj, ĝiaj karesaj radioj glitis super mondo, kiu malfermis tute novan paĝon en la libro de la naturo. La neĝokovrita, arĝente brilanta arbaro definitive malvenkis sub la granda vintroparalizo, kaj filo de la Sudo, kiu venus ĉi tien por hazarda vizito, povus kredi, ke ĉenoj el neĝo kaj glacio por eterna tempo estus forĝitaj ĉirkaŭ ĉi tiu kruda, malabunda lando.

Tra serpentumaj arkadoj, kies tegmenton formas la kronoj de alttrunkaj pinoj kaj piceoj, mi migras en frostoklara vintromeza tago eksteren al Alhammarsudden (terlango). La suno ĵus levis sin kaj pendas super la arbopintoj de Fitjehuvud. Estas benata mateno. Neniu nubo vidiĝas sur la ĉielo, kaj Hjälmaren kuŝas silenta sub sia kovro de neĝo kaj glacio. Ventopuŝo iras ludeme tra la vintra arbaro. La neĝopezaj brančoj moviĝas delikate. Neĝo malfiksiĝas kaj falas kun puŝobruo sur la teron. Neĝosteloj trembrilas en la suno dum sia veturo al la tero, kaj la brančoj balanciĝas gaje post liberiĝo de sia peza ŝarĝo. Malproksime interne aŭdiĝas el mallumaj kaŝejoj la ĉirpaj sonoj de krestparuoj, tiuj etaj vintrobirdoj, kiuj vivas sian silentan vivon kaŝitaj sub piceoj kaj en juniperoj.

Mi iras pli profunden en la arbaro. Min ĉirkaŭas la blanka silento, mi puŝas kontraŭ neĝopezajn brančojn. Neĝo faletas sensone sur la vizaĝon kaj la kolon, freŝigas iomete sed baldaŭ degelas sur la varma haŭto.

En maldensejo supre sur longaltaĵo mi haltas kaj rigardas ĉirkaŭen. Tie estas Utnäs, farmeto jam de longe forlasita. Ankoraŭ troviĝas kelkaj kriplaj fruktarboj sed cetere nur gigantaj juniperoj, simetrie kreskintaj kvazaŭ ili estus formitaj de tornisto. Ĉi tiu maldensejo estus taŭga loko por starigi tendaron, mi pensas. Estas nur mallonga distanco de la longaltaĵo al la lago. Antaŭ la spirita okulo mi vidas nudajn korpojn sin movi en petolaj somerludoj,



aŭdas gajajn vokojn de infanoj, kiuj karakolas en la travidebla akvo de Hjälmaren. Nur kelkaj lunperiodoj, kaj mi ne plu staros sola ĉi tie en la arbara maldensejo.

Komencas krepuski. La malalte iranta suno ruliĝas kiel ruĝa globo inter la arboj. La neĝo ricevas longajn violajn ombrojn, la piceoj pli malhelan nuancon. Mi iras kvazaŭ sencele, serĉante vojon returne al nia kabano en amaso de blankaj arboj kaj neĝokovritaj rokoj kaj ŝtonoj. Mi faletas pro kaŝitaj brančoj, kiuj inside levas sin el la neĝo, ekglitas sur glacikaloj sed falas mole en neĝokavon.

Fine, kiam estas preskaŭ mallume, malfermiĝas la arbaro, kaj mi denove estas proksime al la bieneto de mia amiko. Mi suriras la longan kajponteton, kies malnova trabaro froste knaras sub miaj paŝoj, kaj rigardas ankoraŭfoje la neĝokovritajn vastojn de Hjälmaren, la arbarkovritajn terkolojn kaj insuletojn. La delikata vesperovento igas la kanojn tinti kvazaŭ vitrotigoj. Tiam kaj tiam aŭdiĝas la sibla fajfosono de fendiĝanta glacio.

Malproksime malantaŭ Asön ankoraŭ restas purpura brilo de la foririnta suno. Kontraŭ la malhela firmamento en la nordo akre konturiĝas la blankaj altkreskaj piceoj sur la longaltaĵo. Ili staras silentaj kaj senmovaj ĉirkaŭ Solbacken, kaj super ili flagretas la stelbildo de Granda Ursino, ĵetante sian malfortan rebrilon sur la pejzaĝon en la glacie malvarma vintronokto.

---

# La arto de pensado

De ALF AHLBERG

*Tiu ĉi verketo aperis 1932, eldonita en serio da kajeretoj de la korespondinstituto de la sveda kooperativa asocio. De tiam la enhavo fariĝis ne malpli aktuala. — Por alilandanoj: Fil. dro Alf Ahlberg estas rektoro por la popola altlernejo en Brunnsvik, kie troviĝas ankaŭ la lernejo de la sindikata asocio. Brunnsvik estas vera edukocentro por la sveda laborista junularo. Kiel instruisto kaj preleganto, per longa vico da libroj kaj tradukoj kaj per kunlaboro en gazetoj li estas edukanto en humanismo por la pli granda parto de la popolo, antaŭ ĉio por la laborista junularo. Ke la vasta amaso de la sveda popolo efektive povas sufiĉe multe pensi libere kaj memstare, pri tio ĝi ŝuldas grandan dankon al Alf Ahlberg.*

"Vi ja vidis cerbon ... kiajn kurbvojojn, kiajn kaŝvojojn ... Jes, kaj pro tio ĉiuj pravpensantoj pensas tiel kurbe!"

Estas la poeto en "Sonĝoludo" de Strindberg, kiu diras tiujn vortojn. Lia klarigo estas ja iom arbitra, tiel arbitra kiel poeto rajtu esti — kelkfoje. Homa cerbo vere estas tiel genia, tiel perfekte kaj subtile funkcianta instrumento, ke kompare kun ĝi ĉiuj aliaj instrumentoj estas aĉaj fuŝproduktoj. Sed estas necesaj arto kaj lerto por uzi subtilan instrumenton; ju pli subtila, des pli granda lerto estas necesa. Se la cerbo estas la plej subtila instrumento, kiun ni konas, ĝi certe estas ankaŭ la plej misuzata. Nerefutebla fakto estas, ke ni ĉiuj ĉiutage kaj ĉiuhore misuzas ĝin; ni pensas terure "kurbe". Kaj ne malplej la t. n. "pravpensantoj" de diversaj partioj kaj konceptoj.

Ni ridetas pri la stultaĵoj de pasintaj tempoj kaj kredas nin eksterordinare sagacaj. Kiel oni iam povis kredi tiujn stultaĵojn kaj antaŭjuĝojn, kiujn ni kleraj nuntempuloj lasis malproksime malantaŭ ni? Ĉar oni pensis tiel "kurbe"? Ĉar direktis la iron de la pensoj kutimligeco, fuŝrutino, primitivaj sentoj kaj deziroj, ruzo de potenculoj kaj



sklavomenso de subpremitoj? Eble — sed oni profunde erarus, se oni imagus, ke la nuntempa homo tiurilate estas multe pli bona. Multaj psikologoj en nia tempo asertas, ke kontraŭe la moderna homaro komencas forgesi la arton de pensado. En 1917 oni faris en tre granda skalo statistikajn esplorojn pri la uzonaj rekrutoj por ekzameni — ne iliajn sciojn sed ilian kapablon de memstara pensado. Oni ricevis materialon, kiu ampleksis preskaŭ du milionojn da junaj viroj. Ili certe apartenis ne al la plej stultaj, tamen la rezulto estis timiga. La pensokapablo ĉe kvindek procentoj montriĝis neevoluinta kiel ĉe malgranda infano. Mi opinias, ke oni faru ne tro vastajn konkludojn el tiu esploro; erarkaŭzoj estas multaj kaj la metodoj estas neperfektaj. Aliflanke ĝi memorigas al la nuntempa homo, ke lia inteligento tute ne estas tiel alta, kiel li ofte imagas. La nuntempulo havas tiun avantaĝon antaŭ malnovtempaj homoj, ke li posedas grandan intelektan heredaĵon, povas utiligi tiujn sciojn kaj lertojn, kiujn amasigis la sperto de generacioj. Sed nenio pruvas, ke li en si mem estas pli inteligenta ol tiuj homoj, kiuj faris ekz. la genian eltrovon de la skribsignoj, de la cifera sistemo aŭ de la levilo.

Sed se tiel estas — ĉu ni povas ŝanĝi tion? Ĉu oni entute povas l e r n i la arton de pensado? Ĉu ĝi ne dependas de natura talento, kiun oni havas aŭ ne? Certe ĝis certa grado, sed ne tute. La arto uzi muzikan instrumenton ankaŭ ĝis certa grado dependas de natura talento, sed malgraŭ tio ankaŭ muzika talentulo devas l e r n i tiun arton. Same rilate al pensado: ni ne povas lerni fariĝi "inteligentaj" kaj "sagacaj", sed ni povas lerni uzi tiujn kapablojn, kiujn la naturo donis al ni. Kaj al tiu ekzerco ni certe dediĉas tro malmulte da atento.

Studi la arton de pensado estas unualoke klarigi al si, kiaj m a l h e l p o j troviĝas antaŭ ni, kiam ni provas prave pensi. La unua kondiĉo por ion venki estas informiĝi pri la venkotaĵo. Nia tasko estas do unue ektrovi, kiaj estas la plej ordinaraj kaŭzoj de tio, ke ni pensas tiel "kurbe"; poste ni provos doni kelkajn ĝeneralajn regulojn por klara, orda kaj sistema pensado.

**Kurbvojoj de la pensoj.**

"Pensi libere estas afero granda, prave pensi estas pli granda", oni diras. Kaj neniu povas nei, ke tiel estas — kondiĉe ke oni vere pensas p r a v e, kio estas io tute alia ol tio, ke oni estas "pravpensanto". Sed pensi l i b e r e estas ĉiuokaze neevitebla kondiĉo por povi pensi prave. Kaj same kiel troviĝas multaj, kiuj nomas sin "pravpensantoj", kvankam ili tute ne pensas "prave", tiel troviĝas ankaŭ multe da homoj, kiuj nomas sin "liberpensantoj" kaj "libermensuloj" sed tamen tute ne pensas libere. Ne kredu, ke estas facila afero pensi libere; neniu el ni povas fari tion tute, nur malmultaj el ni ĝis certa grado. Ĉar malantaŭ la ludo de niaj pensoj staras misteraj kaj malfacile atingeblaj reĝisoroj, kiuj puŝas ilin antaŭen aŭ retiras ilin laŭ reguloj tute aliaj ol tiuj vojoj, kiujn ili irus, se ili sekvus la indikojn de klara logiko kaj de senantaŭjuĝa observado. Ni iom rigardu tiujn misterajn reĝisorojn kaj provu nomi ilin per iliaj ĝustaj nomoj.

**Nian pensadon gvidas subjektivaj deziroj.**

Mi volas rekomendi malgrandan eksperimenton, per kiu vi ĝis certa grado povos konstati viajn atingojn en la arto de libera pensado. Pensu pri persono, kiu maljuste agis al vi persone, aŭ kiu vin malhelpas kiel konkuranto, rivalo aŭ politika kontraŭulo. Ĉu vi povas fari pri li vere objektivan kaj fidindan prijuĝon? Ĉu vi estas preta atribui al li tiujn bonajn kvalitojn, kiujn li fakte h a v a s? Ĉu vi kapablas diferencigi tiujn du aferojn: unuflanke, ke li estas homo, kiun vi devas kontraŭbatali, ĉar tion postulas viaj aspiroj aŭ personaj interesoj — aliflanke, ke li estas homo, al kiu, en lia kvalito de homo, vi povas doni estimon kaj plenan juston? Certe la plej multaj teorie asertas, ke ili povas fari tiun diferencon, sed ili malsukcesas, kiam ili troviĝas en la efektiva situacio. Jen la ordinara konkludo: "Ĉ a r tiu homo baras mian vojon, li estas nesimpatia homo, fripono, malbonkvalita persono." Tio estas, oni ne pensas tiel klare, kontraŭe oni provas konvinki sin mem kaj aliajn,



ke oni bazas sian aserton sur faktoj kaj logikaj konkludoj. Sed efektive estas d e z i r o, kiu direktas la pensoproceson. Estas tio, kion oni nomas "virina logiko", kvankam viroj certe uzas ĝin en sama grado. La mondmilito en granda skalo ilustris tiun specon de pensado. Kiam la soldatoj batalis ĉe la frontoj, profesoroj kaj jurnalistoj sidis malantaŭ la frontoj kaj klopodis pruvi, ke la malamikaj popoloj estas hunoj kaj barbaroj, dum la propra popolo reprezentas la kulminon de ĉiuj homaj virtoj. En Germanujo naŭdek ok profesoroj, inter ili multaj science mondfamaj, subskribis aserton, ke eĉ unu germana soldato ne faris kruelaĵon kontraŭ civiluloj en Belgujo. Eĉ ne unu? Kiel ili povis tion scii? Ĉu estis eble por ili tion scii? Kompreneble ne. Sed ili pruvis, ke tio ne e s t u s p o v i n t a okazi (ĉar tio estus kontraŭ la "germana popolkaraktero"), kaj ke tial ĝi ne okazis. — Ni trovas tion absurda, sed tagon post tago ni en ĉiu gazeto trovas rezonadojn, kiuj ne pli ol tiu pruvado apartenas al libera pensado. Kaj ni devas ne fieri, ĉar ree kaj ree ni estas mem gvidataj de la sama virina logiko. Ni v o l a s, ke io estu tia aŭ tia, kaj ĉar ni tion volas, ni nerimarkate ŝanĝas nian deziron en fakton. La deziro kreas la kredon — ne nur la religian sed ankaŭ ekz. la politikan. La deziro falsas faktojn, kaj el falsitaj faktoj ĝi tiras falsajn konkludojn.

Kian grandan rolon la deziro havas kiel reĝisoro de niaj pensoprocesoj, tion evidentigis precipe tiu direkto de moderna psikologio, kiun oni nomas psikoanalizo. En la mondo de la sonĝoj ni libere formas niajn imagojn laŭ nia deziro. Freud montris, kiel deziroj konstruas la ŝvebantan mondon de la sonĝoj. Ĉio estas ebla tie, malhelpoj ne ekzistas, kion ni plej arde sopiras, tio okazas, kvazaŭ ni estus mastroj super la obeaj spiritoj de la mirinda lampo. La malriĉulo havas amasojn da oro, la soifanto aŭdas plaŭdantajn fontojn, la malsatulo sidas ĉe tabloj premataj de frandaĵoj. Sed en la kruda mondo de la realo ni renkontas nevenkeblajn barojn. Ni ne povas fari oron el nenio, ne povas iri tra muroj el granito. Kaj tamen ankaŭ tie revo kaj sopiro aliformas. Ni havas neforigeblan emon

aranĝi la realon por ni en tiu maniero, kiu plej bone koincidas kun niaj deziroj. Ni facile kaj senkritike akceptas tiun opinion, kiun ni deziras prava, sed kontraŭ mala opinio ni estas kritikaj. Prefere ni devus fari male. La plej multaj el niaj opinioj kaj konvinkoj estas tio, kion oni en psikologio nomas *raciigoj*, t. e. tiuj opinioj, kiujn ni *volas* havi, kaj pri kies praveco ni tial provas konvinki nin. Ordinare ni ne havas opinion pro tio, ke ni per sperto kaj logika pensado konvinkis nin pri ĝia vero, sed ĝuste pro tio, ke ni *volas* havi ĝin, ni provas konvinki nin pri ĝia vero. Ni fermas la okulojn por tiuj faktoj, kiuj parolas kontraŭ ĝi, kaj ni pligrandigas tiujn faktojn, kiuj parolas por ĝi. La deziro ofte estas *nekonscia* kaj ĝuste tial des pli danĝera; oni kredas pensi libere, dum oni efektive estas gvidata de sekreta deziro.

Kiu ne vidas, ke ekzemple "burĝaj" kaj socialistaj soci-ekonomiistoj, farante valorprijuĝojn aŭ antaŭdirojn pri estonto, ambaŭflanke lasas sin influi de sekretaj deziroj. Ambaŭ havas la saman realon antaŭ si, sed la volo gvidas (eble "kontraŭ ilia volo", t. e. ilia *konscia* volo) tiun pensoproceson, per kiu ili interpretas kaj aliformas tiun realon. — Kial en diskuto estas ĝenerale ne eble konvinki la kontraŭulon? — Pro tiu simpla kaŭzo, ke li ne *volas* lasi sin konvinki. Estas kontraŭ lia memsento fariĝi "refutita", kaj krome temas eble pri lia favorata opinio, kiun li ne volas oferi. Ni ĉiuj estas tiaj pli malpli: instinkte ni defendas niajn opiniojn kvazaŭ temus pri defendo de la vivo. La dikredanto ne legas "senkredajn" skribajojn, ĉar li timas skuon de sia kredo kaj maltrankvilon en la animo. Li preferas la pli facilan manieron kondamni ilin nelegitaj. Ano de politika partio legas ordinare la gazetojn nur de sia partio kaj lasas ilin aranĝi por li faktojn kaj eventojn. Oni preferas ignori tiujn eble ĝenajn faktojn, kiujn eventuale povus prezenti la gazetoj de kontraŭa partio.

Multe oni povus diri pri tiu rolo, kiun deziro ludas por la pensado, kaj tio ne nur en la pli primitiva sed ankaŭ en la subtile scienca pensado. "Eĉ filozofoj, kleruloj kaj sciencistoj", diras prave J. H. Robinson en sia libro



*Kutimpensado kaj progreso*, "montras ĝeneralan sentemon, kiam temas pri konkludoj, al kiuj rilatas ilia memamo. Miloj da pamfletoj estas verkitaj por doni eliron al envio. Kiel grandioza la pruvo en ili povas ŝajni, ĝi tamen eble estas nura raciigo, kiun stimulis plej banalaj motivoj. Oni povus skribi historion de filozofio kaj teologio per vortoj de kolero, malestimo kaj ofendita fiero ..." Cetere oni bezonas pensi nur pri la akademiaj plendoskriboj, kiuj ĉiam akompanas ĉiun konkuron pri profesora katedro. Kiam la propra malgranda intereso influas, la pensado tuj fariĝas malklara kaj sentoŝarĝita, eĉ se temas pri aferoj ŝajne tre "objektivaj".

La unua kondiĉo por "libera" pensado do estas, ke oni havas kuraĝon kaj volon *akcepti faktojn*. Homo eterne restanta infano ne fariĝas libere pensanta kaj matura homo. Infano postulas, ke la tuta realo adaptu sin al *ĝia* privata dezireto. Maturiĝi signifas ekvidi la grandajn objektivajn interrilatojn, kiuj tre malmulte atentas pri la interesoj de la malgranda memo.

## La ĝenerala opinio estas baro por libera pensado.

Alia reĝisoro, kiu gvidas niajn kurbajn pensirojn, nomiĝas kutimo kaj fuŝrutino. Se papero longe kuŝis rulita, ĝi havas emon denove ruli sin, kiam oni malrulas ĝin. Simile nia penso havas emon sekvi la malnovajn vojojn, al kiuj ĝi kutimiĝis. Certa forto estas necesa por rompi tion. Foje oni bezonas verajn rompferojn por disigi la pensoligojn, kiuj kunkreskis de la infanaĝo. Penso paradokse formulita povas foje esti tia rompfero. "La tasko de paradokso", skribas Hans Larsson* bone kaj trafe, "estas disrompi erare kunkreskintajn imagoligojn. Ĝi devigas nin rigardi aferon de nova flanko." Ni memoru, ke nenio estas vera kaj prava nur pro tio, ke ni tion aŭdis multfoje, aŭ pro tio, ke tion ripetas miloj aŭ milionoj. La vero ne estas afero de voĉoplimulto. Eble estas foje necese hurli kun la lupoj, sed se vi volas lerni pensi libere, vi devas ĉesi bleki

*) Sveda filozofia profesoro; 1862—1944.

kun ĉiuj ŝafoj blekantaj. Ĝuste la plej ĉiutagaj, plej ofte aŭdataj asertoj, eble estas sufiĉe ofte la plej dubindaj. Oni senpense ripetas ilin, kaj nur malmultaj trovas necese esplori, kiaj ili efektive estas. La sana racio ofte ne estas tiel racia, kiel oni kredas — nek tiel sana. La grandeco de la originalaj, novkreantaj pensuloj ofte estis ĝuste tio, ke ili dubis pri la ĝenerale aprobitaj veroj de la sana racio. Por la sana racio la tero dum multaj jarcentoj estis plata kiel patkuko. Kiam kelkaj neordinaraj spirituloj komencis dubi pri tio, ankaŭ la sana racio iom post iom trovis ĝin globa. — Tamen nur post kiam ĝi longe en la nomo de la sana racio pelĉasis tiujn, kiuj havis opinion tiel kontraŭan al la sana racio. —

Kio estas "la ĝenerala opinio"? K i u havas tiujn opiniojn, kiujn oni atribuas al la ĝenerala opinio? La pli multaj? Eĉ ne tiuj. Foje la ĝenerala opinio estas pensomaniero, kiun efektive neniu havas, sed pri kiu ĉiuj kredas, ke ĉiuj aliaj havas ĝin. Vi memoras la novajn vestojn de la imperiestro. "La ĝenerala opinio" en la regno de la imperiestro estis, ke li portas la plej belajn, plej mirindajn vestojn. Ĉiu kredis, ke ĉiuj aliaj vidas la belajn vestojn, kaj tial ĉiu ankaŭ klopodis kredi, ke li vidas ilin. Sed fine infano aperis kiel la libera pensanto kaj malkaŝis, ke la imperiestro estas tute nuda. Kiel ofte ne ripetiĝis tiu historio en la vivo; nia tempo prezentas bonajn ekzemplojn. La kritiko grandiozigas libron, modon, "-ismon" ĝis giganta mezuro, kaj tuj troviĝas centoj kaj miloj da troflatemaj akompanantoj, kiuj timas esti malmodernaj kaj tial trovas la libron, la modon kaj la "-ismon" sublimaj, kvankam ili efektive ne o p i n i a s tion. Ili ne kuraĝas pensi libere, timante peki kontraŭ la ĝenerala opinio — kiun eble n e n i u efektive havas.

Ĉar ankoraŭfoje — k i u havas la ĝeneralan opinion? K i u efektive pensas, kiam oni parolas pri "la ĝenerala pensomaniero"? La afero estas jena? Ni estas ĉiuj pli malpli parte privataj, parte "publikaj" personoj. Private ni e s t a s io, kaj en la socio ni p r e z e n t a s ion. Tial ni ankaŭ pensas en du manieroj. Nia memo estas kvazaŭ



dividita en privatan kaj socian parton. Kion la socia parto de nia memo pensas, tion oni nomas la ĝenerala opinio. Por sia pensado kiel privata homo oni respondas nur antaŭ si mem, por sia pensado kiel "publika" homo oni devas respondi antaŭ aliaj.

Apenaŭ estas refuteble, ke tio, kion ni nomas "la ĝenerala opinio" ĉeftrajte troviĝas sur pli malalta nivelo ol la privata pensado de ĉiu unuopulo. Kaj la danĝero por la libera pensado en nia tempo ne estas kiel antaŭe en tio, ke oni ne r a j t a s pensi libere, sed pli ĝuste en tio, ke oni ne plu p o v a s tion fari, ĉar ĝuste "la ĝenerala opinio", fabrikita de la propagando de diversaj interesogrupoj (gazetaro, radio, filmo ktp.) estas ekstermanta la individuan pensadon. Oswald Spengler en sia libro pri la pereo de la Okcidento forte akcentas tiun danĝeron por libera pensado, kiu troviĝas en aktualaj opinioj, kiujn disvastigas la giganta reklamaparato de nia tempo. Ne senkaŭze li aldonas: "La leganto neniel scias, kiel oni lin traktas, tion li ankaŭ ne devas scii . . . Pli timiga satiro pri la pensolibero ne ekzistas. Antaŭe oni ne kuraĝis pensi libere; nun oni kuraĝas, sed oni ne povas plu."

## Ĉiuj pravpensantoj pensas kurbe.

Kiel reĝisoroj de niaj pensoprocesoj funkcias ne nur la privataj — konsciaj aŭ nekonsciaj — deziroj kaj la ĝeneralaj opinioj (sana racio) sed ankaŭ tiuj trudinfluoj, kiujn ni ricevas kiel membroj de grupo, de partio, de ia socia frakcio. La d o g m a pensado estas baro por la l i b e r a pensado.

Ekzistas dogmoj de multaj specoj: religiaj, politikaj, ekonomiaj, moralaj, estetikaj. Nuntempaj homoj emas kredi, ke ilia pensado estas malpli dogmoligita ol tiu de pasintaj tempoj. Tio dependas eble nur de tio, ke ni anstataŭigis certajn dogmojn per aliaj. Antaŭe oni unualoke pensis pri religiaj dogmoj, kaj tiaj en alta grado regis la pensadon. Nun temas pli multe pri dogmoj politikaj, ekonomiaj, estetikaj. Kompreneble estus nura naivaĵo

nei, ke ekz. en moderna socio politika partiformiĝo estas necesa por ion atingi, kaj ke la politika vivo postulas certan partidisciplinon en la agoj. Ne fariĝas ordo en armeo, se ĉiu soldato agas tiel, kiel li private opinias ĝuste. Devas troviĝi unueca gvido, kaj la unuopulo ne rajtas fari obstrukcon per siaj privatopinioj. Tamen, se la partio havu eblojn por moviĝi kaj evolui, lia pensado ne estu premata en la kurbajn vojojn de la partidogmoj. "Partio estas kvazaŭ viandmuelilo, kiu kunmuelas ĉiujn kapojn en unu kaĉon", diras Ibsen. "Kaj pro tio ĉiuj partioj pensas tiel kaĉe." Tiel ne devus esti, sed ofte tiel estas. La propra partio, la propra grupo pensas "prave", ĉiuj aliaj partioj kaj grupoj pensas malprave — laŭ tiu simpla formulo nia pensovivo ne rajtas movi sin, se ĝi meritu la nomon de pensado.

Kiel ilustran ekzemplon pri la rolo de la dogmoj en niatempa scienca pensado ni povas rigardi la modernan raspsikologian esploradon. Unu el la plej eminentaj psikologoj nuntempaj, Ernst Kretschmer, diras pri tiu scienco jene:

"La rasa psikologio estas ankoraŭ malmulte edifa ĉapitro. Ne tiel, ke estas neĝustaj ĉiuj asertoj de la rasteoriuloj pri la diversaj spiritaj kvalitoj de la rasoj, sed ili estas preskaŭ ĉiam tiel unuflanke elektitaj kaj montritaj, ke la suma impreso fariĝas nura fuŝbildo. Tiuj psikologiaj disertoj pri rasoj estas preskaŭ ĉiam tiel skribitaj, ke la aŭtoro per ŝajne sciencaj rimedoj celas glori sian propran rason aŭ almenaŭ siajn proprajn politikajn tendencojn aŭ revaĵojn. Rigardante tiujn bildojn de la homrasoj ni tuj rimarkas, se niaj okuloj estas ekzercitaj, ke el la buŝo de la aŭtoro pendas slipo kun lia politika devizo. La aŭtoro malamas la judojn aŭ entuziasmas por la aristokratoj. Se franco, li gloras sian propran popolon sub la kaŝnomo "la kelta raso", se germano, la germanajn idealojn sub la kaŝnomo "la norda raso" ... Tiu vojo ne kondukas al objektivaj scioj sed nur al plifortigo de antaŭjuĝoj, vanto kaj malamo inter la diversaj popoloj kaj al tre nematuraj popolpolitikaj eksperimentoj."



Ege granda estas en nuntempa pensado la rolo de antaŭjuĝoj grupaj, klasaj, naciaj. Ni devas plivastigi nian pensovivon kaj lerni direkti la rigardon al pli grandaj tutaĵoj, se ni volas atingi tiun alton, kie la pensoj povas flugi. Ni provu pensi prave, sed ni ne fariĝu "pravpensantoj".

### Kiel vortoj regas pensojn.

Fine ni diru kelkajn vortojn pri tiu reĝisoro de nia pensoproceso, kiu nomiĝas lingvo. La lingvo estas h e l p o por la pensado, ĉar penso fariĝas klara kaj firma, nur kiam ni povas formuli ĝin per vortoj. Se vi volas kontroli, ĉu vi vere komprenis pensoĉenon, provu skribi ĝin. Se vi ne povas tion fari, tio tre verŝajne montras, ke vi ne funde komprenis la pensoĉenon. Certe estas multe da vero en la famaj vortoj de Tegnér*:

> Kion vi ne povas klare diri, tion vi ne scias;
> kun la penso naskiĝas la vorto sur la lipoj de la viro:
> malklare dirite estas malklare pensite.
>
> (Laŭvorta traduko)

Sed la lingvo povas ankaŭ fariĝi baro por la pensado, ĉar okazas, ke "kie penso mankas, tie vorto staras servopreta". Oni devas vesti la pensojn per vortoj, bonaj, klaraj, firmaj vortoj, ĉar nur en tiu ekipo ili povas iri en la mondon kaj labori. Jes, eĉ ĉe la pensanto mem ili verdire ricevas tute klarajn konturojn, nur kiam ili prenas la formon de vortoj. Sed vortoj fariĝas danĝeraj por la penso, kiam ili volas agi memstare, kiam ili volas a n s t a t a ŭ i la penson. Kaj tion ili tro ofte volas. Estu singarda rilate al vortoj: ili estas insidaj. Per helpo de vortotorento oni ne malofte sukcesas konvinki sin mem kaj aliajn, ke oni pensas, kvankam oni ne havas eĉ unu klaran, veran penson en la kapo. Oni kaptas la f r a z o n, la frazon, kiun Carlyle ne senkaŭze nomis "m a t e r i a p r i m a de la diablo, el

*) Granda sveda poeto; 1782—1846.

kiu venas ĉio falsa, malforta, abomeninda, el kiu povas veni nenio vera." Oni kaptas la eluzitajn kaj kutimajn agitvortojn, kiuj trosimpligas kaj sennuancigas la realon, kiuj markas ĝin per linioj arbitraj aŭ eraraj. Oni lasas sin sugestii de la sonoro mem de la vortoj, kaj la penso estas endormigata. Oni aŭdas vortojn multajn fojojn, ĝis oni forgesas, ĉu oni iam vere komprenis ilian signifon. Kiel ofte vi ne aŭdis vortojn kiel "produktantaj fortoj", "kapitalo", "funkcio", "ideologio". Ĉu vi tute certe scias, kion ili signifas, se oni postulas de vi klarigi tion? Kiom da signifoj ne povas havi vorto, kaj kiel malfirma kaj glita ne fariĝas la penso, kiam ĝi ne diferencigas la diversajn signifojn! Pensu pri la vorto "libero"'. Ĝi havas certan solenan sonoron, kaj oni volonte kredas, ke libero en ĉiuj cirkonstancoj devas esti io bona. Dependas de tio, pri kia libero temas. La vorto libero signifas du aferojn: unue libero de malhelpo de iu aŭ alia speco, due libero por io. En ambaŭ okazoj povas esti io bona aŭ io malbona. Ke sklavo liberiĝas de siaj katenoj estas bone, sed ne estas bone ke mi liberiĝas de la devo agi kun konsidero al miaj kunuloj. Ke mi posedas liberon (t. e. potencon) por realigi bonan celon estas bone, sed ke mi posedas liberon (potencon) por subpremi kunulojn ne estas same bona. Sed nun oni kunmetas ĉiujn tiujn signifojn de la vorto en unu aferon kaj kantas kontente: "El ĉiuj aĵoj sur la ter' plej bona estas la liber' "*, ne atentante pri la koncernata speco de libero. Tio estas pensomanko, kiu povas fariĝi fatala.

"Kio ebligas krimosenkulpigajn sofismojn? La doktrino, ke nuancoj neniom signifas." (Hans Larsson) Kio, oni povas daŭrigi, ebligas la pli malbonajn formojn de demagogio? Ĝuste la sama doktrino. Frazo troigas, preterlasas nuancojn kaj gradodiferencojn kaj tial nerimarkate transiras en mensogon aŭ duonveron, kiu lasta estas preskaŭ ankoraŭ pli malbona. "La laborista klaso", mi ĝuste nun okaze legas ĉe iu aŭtoro, "estas bonvola, grandanima klaso,

*) Sveda poemo el la fino de la meza epoko.



kiu klopodas por la bono de la homaro, dum la burĝa klaso estas rabavida, profitema ktp." Nu! — Jam tiu "ktp." estas grandioza en sia nekonscia komiko. Ĝi signalas al tiu, kiu komprenas legi: nun ni jam komencas la malnovan bonan kanton, la reston vi povas mem aldoni. Kiu — sendepende de ĉia partikoncepto — ne reagas antaŭ tia sensencaĵo, tiu faris ne multajn paŝojn sur la vojo al la arto de libera pensado.

Kiam ni provas pensi pri iu demando, ni do ne lasu nin erarigi de plursignifaj vortoj, de frazoj kaj agitvortoj. Penso vestita per la ĝusta vorto estas bela kreaĵo, militisto bone armita. Vorto sen penso estas birdotimigilo, kiu prezentas ion sed ne estas tio.

*

Ni provis tie ĉi montri kelkaj malhelpojn por libera pensado. Sed ne sufiĉas forigi la barojn, ne sufiĉas havi eblojn pensi libere, oni devas ankaŭ povi pensi por ion atingi. En sekvanta artikolo ni provos doni kelkajn konsilojn kaj sugestojn por positiva uzado.

Trad. S. Engholm.

## Aŭtuna memoraĵo.

De MARTTI SUOMINEN

Nun ankoraŭ post pasintaj jaroj
en memoro restas la momento
sub tremolo, kiam foliaroj
flavaj flugis pro aŭtuna vento,

kiam suno ĝuste foriranta
kolorigis la preĝejan turon
kaj arbsuprojn. Paro silentanta
aŭdis sole la folisusuron.

Kaj la manoj milde kunpremataj
sentis nur tremetojn de la koro.
Ambaŭ pensis: Sole sentoj ŝataj
ĉe ni restos post ĉi tiu horo.

Kaj ankoraŭ post pasintaj jaroj
ĝojo-larmoplenaj en memoro
restas la moment' kaj foliaroj,
kaj amare-dolĉe batas koro . . .

---

### Informe.

Malgranda Revuo aperas kvaronjare. Prezo 1 kr., je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. (inkluzive sendkoston). Abono de la 3 venontaj nroj por 1944 kaj antaŭmendoj de revendantoj estas danke akceptataj, ĉar tio simpligas kaj plimalkarigas la distribuon. Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika. Poŝtĉeka konto 26 80 23.